

# BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher  
Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 1

Januaro / Februaro 1979



## La kongresurbo de la 31a IFEF-kongreso



## Finnlando gastigos la 31an IFEF-kongreson

La lasta BULTENO informis pri la vojaĝeblecoj al Turku, kie okazos la venonta kongreso de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF) inter la 15a kaj 21a de Junio 1979. Hodiaŭ sekvas ankoraŭfoje vojaĝinformoj kaj detaloj pri la kongresurbo kaj la programo.

La redakcio

Ankoraŭfoje estu atentigata pri la antaŭ-kongreso en Kopenhago (13.6.), kies kostoj estas ĉ. 60 GM. Kiu ne intencas partopreni ĝin, tamen povas mendi la komunan vojaĝon de Kopenhago al Stokholmo (tien en sidvagono, reen en kuŝvagono) kaj de Stokholmo al Turku per ŝipo (tien kaj reen) en dulita kajuto. Tiu „pakaĵo“ inkludas ankaŭ manĝojn en la ŝipo kaj kostas 140 GM. Pro la tuja reveturo post la kongreso la partopreno al la postkongreso ne eblas.

Pli multekosta estas la transmara vojaĝo de Lübeck-Travemünde al Helsinki. Transporto kaj loĝigo sen manĝoj kostas en kvarlita kajuto (kategorio C) 140, — GM por unu direkto respektive 238, — GM tien kaj reen. En dulita kajuto (Kategorio B) kun necesejo kaj duŝo la respektivaj prezoj estas 234 GM kaj 398 GM. La kajuto de la kategorio A, ekipita kiel la dulita kajuto, sed pli granda kaj kun fenestro, permesas la loĝigon ĝis 4 personoj. Prezojn por tiu aranĝo demandu ĉe kol. Barnickel (Basa 954/5537). La indikitaj prezoj estas jam reduktitaj kaj aplikeblaj nur, se la kongreanoj mendas la deziritan liton senpere kaj germanlingve ĉe la ŝipkompanio Finnlines GmbH, Dornestraße 56, 2400 Lübeck (telefon. 04 51 / 88 13 33) menciante „Esperanto-Kongress Turku“. La ŝipo forveturas de Lübeck-Travemünde Skandinavienkaj je la 18a horo la 11an, 13an kaj 15an de Junio. Alveno la sekvan posttagmezon je la 17.30 horo. Reveturo ekde Helsinki la 21an, 23an aŭ 25an de Junio.

En Finnlando kun siaj 4,8 milionoj da enloĝantoj la urbo Turku, svedlingve Abo, havas elstaran pozicion. Turku estas ne nur la plej malnova urbo; ĝi estas ankaŭ la iama ĉefurbo de Finnlando. Universitato,

varispecaj industrioj, komerco, trafiko kaj precipe la haveno destinas la vivon de la kongresurbo. Bedaŭrinde, pro furioza bruliĝo antaŭ 162 jaroj, postrestis nur la katedralo kaj kastelo, lignaj dometoj de tiutempaj metiistoj kaj la malnova akademia domo. La nunan urbon karakterizas nove konstruitaj larĝaj stratoj, novklasikstilaj domegoj kaj la parko-areo tie, kie troviĝis la urbcentro antaŭ la bruliĝo.

La kongresanoj loĝos grandparte en someraj hoteloj, t.e. domaro kun liberigitaj dulitaj ĉambroj de studentoj. Samloke troviĝas la moderna kongresejo Ikituuri, kie estas disponeblaj ankaŭ pli multekostaj hotelaj ĉambroj.

Escepte de la fakto, ke la kongreso komenciĝos jam vendredon, la kongresprogramo enhavos la kutiman sinsekvon. Detalojn vidu en la Internacia Fervojisto. El la duontagaj ekskursoj unu kondukos nur 16 km for de Turku al la idilia marborda urbeto Naantali, kiu evoluigis ĉirkaŭ monaĥinejo fondita en la 15a jarcento. La kerno estas la konservita preĝejo, al kiu kondukas mallarĝaj stratetoj. Ĉio elspiras romantikon de pasinteco. Sur la apuda insulo Luonnonmaa situas la rezidejo de la respublika prezidanto kun unika parko.

Per alia duontaga ekskurso la kongresanoj konatiĝos kun la regiono ĉirkaŭ Turku. Oni uzos ankaŭ motorŝipon. Sur la insulo Alö estos vizitata la urbo Parainen kun sia mezepoka preĝejo kaj la apuda muzeo. La industria evoluo manifestiĝas per moderna kalkŝtonmuzeo. Sur la vojo reen estas videblaj insulaj pejzaĝoj kaj la plej longa pendoponto de Finnlando.

La tuttaga ekskurso precipe allogos la amikojn de muzeaj fervojoj. Inter Jokioinen kaj Minkiö trafikas etŝpura fervojo por turistoj funkciigata per libervolaj emeritaj fervojistoj. Alia celo estos la urbo Hämeenlinna kun sia malnova kastelo el la 14a jarcento krome la turista centro Aulanko.

Dum la IFEF-kongreso oni konatiĝos kun la sudo de Finnlando.



Por kompletigi la bildon de finnlanda somero, estas rekomendinde partopreni la postkongreson al la provinco Laponio, kie en Junio la suno ne subiros. La prezo estas ĉ. 300. — GM. La vojaĝo komenciĝos la 21an de Junio vespere per litvagono. 800 km norde de Turku finiĝas la fervojo en Rovaniemi. Tie estas proksima la polusa cirklo. La postkongresanoj festos la mezsomeran nokton per gajaj fajroj kaj dancoj. Eble oni renkontos ankaŭ la Samojn, la praloĝantojn, kiuj vagas ankoraŭ kun siaj gregoj. La reveturo, denove per litvagono al Helsinki, okazos la 23an de Junio vespere.

Verdire Finnlando estas multifaceta lando kaj tute alia ol iu lando en Mezeŭropo. Kiu ne eluzas la okazon travivi tie la 31an IFEF-kongreson kune kun multaj gekolegoj kaj amikoj, maltrafos unikan ŝancon. Ne timu la elspezojn por la vojaĝo kaj la longajn vojojn. Aliĝu eble plej baldaŭ. Vi estas bonvena.

W. B.

Anmeldeschluß: 28. 2. 1979 (ermäßigter Beitrag), sonst ab 1. 3. 1979 mit 50% Aufschlag.

Anmeldeschluß für den Vorkongreß und die Gruppenreise ab Kopenhagen und zurück bis 25. 3. 79 (gleichzeitig Zahlungseingang der Gebühren).

Wir verweisen nochmals auf Bulteno 5/78 — Seite 11 — mit allen Angaben, die sich auf vorstehenden Beitrag beziehen.

Anmeldevordrucke für den Kongreß können Sie über Ihren Bba erhalten. Vordrucke für die Veranstaltung in Kopenhagen und/oder die Gruppenreise können bei G. Thuesen, Langekaervej 40, Dk-2750 Ballerup, Telef.: 02 97 76 21 angefordert werden. Beachten Sie auch bitte alle Informationen in IF.

W. G.

### ■ Nutzen Sie Ihre Chance!

Der Wettbewerb zur Mitgliederwerbung läuft noch

■ bis 28. Februar!


Alles Nähere im Bulteno 5/78 Seite 8  
Bitte helfen Sie mit!

## Aus den Gruppen

### Stuttgart

#### 1. Esperanto-Informations-Ausstellung

Der Bezirk Stuttgart hat im Jahr 1979 die GEFA-Jahresversammlung auszurichten. Aus diesem Grund wollten wir nochmals frühzeitig über Esperanto informieren und möglichst einen Sprachkurs beginnen. Vom 6. — 8. 11. 1978 wurde in einem großen Besprechungszimmer der Bundesbahndirektion eine gut ausgestattete Informations-Ausstellung vorgezeigt. Material dazu lieferten München (Esperanto-Club), Heilbronn (Esperanto-Gruppe), Augsburg, Oberkirch und Hannover (GEFA-Bibliothek). Wir hatten keine Mühe gescheut und wurden vom BSW-Ortsvorstand großzügig unterstützt. Die Ausstellung war während der Arbeitszeit geöffnet und hat leider nur knapp 100 Besucher gehabt. Der Sprachkurs mit wöchentlich einer Stunde nach Dienstschluß hat 6 Teilnehmer, die nun auch noch nach der 5. Stunde (Unterricht nach der direkten Methode) fröhlich mitmachen.



### Esperanto-Informationsausstellung Stuttgart

#### 2. Zamenhof-Feiern

Zusammen mit den örtlichen Esperanto-Gruppen in Heilbronn und Stuttgart wurden am 8. und 9. 12. 1978 gut besuchte Zamenhof-Feiern abgehalten. Festredner war bei beiden Veranstaltungen unser Kollege Otto Walder aus Romanshorn (Schweiz). In Heilbronn berichtete zusätzlich Herr Schlumberger aus Heidenheim über den UEA-Kongreß 1978.

### 3. 23. GEFA-Jahresversammlung vom 5. — 7. 10. 1979 in Heilbronn

Die Vorbereitungen für diese Veranstaltung sind angelaufen. Merken Sie sich bitte schon jetzt den Termin vor und freuen Sie sich auf Heilbronn (Weinbau, Geburtsstadt J. R. v. Mayer) sowie auf die Ausflüge nach Weinsberg (Burgruine Weibertreu, J. Kerner-Haus) und Bad Wimpfen (alte Kaiser- und freie Reichsstadt am Neckar).

Nähere Informationen folgen im Bulteno 2/1979.

1977 verstarben die Gruppenmitglieder: BAmtm a. D. <b>Wilhelm Böhm</b> * 18.3.17 † 29.10.77 Abnahme-Ing. a. D. <b>Theodor Fischer</b> * 2.3.87 † 3. 8.77
--

### Nova Esperanto-prospekto

La Turisma Oficejo en Nancy ĵus eldonis novan 10-paĝan ilustritan prospekton tute en Esperanto. Ĉiu interesato povas ricevi ĝin senpage. Nancy situas en Nordorienta Francio, ĝi estas eŭropa vojetapo inter Benelukso aŭ Germanio kaj Mediteraneo unuflanke, aŭ inter Benelukso kaj Svislando, aŭ Germanio kaj Parizo aliaflanke. Nancy posedas interesajn muzeojn kaj monumentaron de la 18a jarcento, kaj ĝi estas elirpunkto por belegaj ekskursoj. Antaŭ ol viziti Nancy, avertu la lokajn Esperanto-delegitojn.

Por ricevi la prospekton, oni turnu sin al:  
Turisma Oficejo — 14, Place Stanislas  
F-54000 NANCY

### Dum Oktobro 1978 aperis . . . .

la traduko de la Komuna Internacia Tarifo por la Transporto de Pasaĝeroj kaj Pakaĵoj (TCV). Temas pri la kajero I kun la Generalaj Transportkondiĉoj, kiuj konformas al la plej nova stato (01.11.1978). La modelan tradukon prizorgis Nils Gösta Narvala (Finnlando), la revizion Gernot Ritterspach (FR Germanio) kaj Ljudevit Sekereš (Jugoslavio). Elisabeth Ritterspach tajpis la kajeron. Kiel eldonanto signas la Internacia Fervoja Esperanto-Federacio. Ĉiu bileteldonejo kaj vojaĝagentejo, kiu rajtas vendi internaciajn biletojn, posedas tiun dokumenton en la nacia lingvo. Tiu eldono estas bonega ekzemplo pri sukcesinta fervoĵfaka traduko. Interesuloj turnu sin al s-ro Gernot Ritterspach, Berliner Allee 1, 6070 Langen aŭ telefonu Basa 954/5533. W. B.

## Faka angulo

### Japanaj lokomotivistoj kun blankaj gantoj

„Ŝinkanzen“ signifas nova magistralo, la nomo simbolizas modernegan vojaĝ-komforton. Intense oni preparadas la pilongigon de la fama linio norden kaj suden por interligi la tri ĉefajn insulojn de Japanio: ekpaŝo en la 21an jarcenton.

En Kioto, la iama japania ĉefurbo. Per belsona akordo je la 6a matene vekigaŝas la ĉefstacio. Ripetiĝas kaj reeĝas la gongosonoj, eklumiĝas la haloj, vigliĝas la tuta 1176 km longa magistralo kaj la unuaj ekspres-trajnoj ŝovas siajn jetprofilajn nazojn el la stacioj de Tokio, Osaka kaj Hakata. 28 stacioj troviĝas inter Tokio (meze sur la ĉefinsulo Honŝuo) kaj la provizora suda liniofino ĉe la golfo de Hakata sur la insulo Kjuŝuo kun la pezindustria centro Fukuoka.

Belaj estas la skribsignoj sur la vojaĝbileto, sed legebla por ne-japano restas nur la ciferoj, el kiuj li devas diveni, kio estas dato, vagono, sidloko, prezo. Precipe gravas la vagona numero, ĉar ĉio, ankaŭ la en- kaj eltrajniĝo, celas al rapideco. Transporto de poŝto, fraĵto aŭ vojaĝpakaĵoj forrestas.

Sur la kajo flavaj aŝiŝoj signas la vagonnumerojn, sagoj surplanke markas la enirejojn. Viroj grupiĝas ĉe tiuj sagoj, kaŭre eksidas atendante. Multaj portas ĉemane plastikajn botelojn kun teniloj: la matenan teon. Estas la sesa horo kaj 19 minutoj. La eksprestrajno, kiu forlasis antaŭ 20 minutoj kun 16 vagonoj la industriaran centron Osaka (aŭtomobilo bezonus 1 horon ĉe favoraj kondiĉoj), haltas centimetroj-ekzakte je la sagoj: japana precizemo. Kajo kaj vagonplanko estas egalaltaj, en la vagono maldekstre dulokaj sidvicoj, dekstre trilokaj. Bluj sidremburĵoj, grizaj dorsapogiloj, aŭtomataj pordoj. La unua klaso kun ambaŭflanke du sidlokoj nomiĝas „verdaj vagonoj“.

La kajoĉefo levas ruĝan flageton, la trajno preskaŭ senskue ekveturas. Aŭdiĝas mallaŭta motorzumado, sentiĝas la reloj sub la radoj — fervoja atmosfero. La termometro indikas 23 gradojn. Oni rajtas fumi, ĉie. Knabino puŝas ĉareton kun bakaĵoj, trinkaĵoj kaj gazetoj tra la larĝa mezkoridoro, la kartontaso kostas ĉirkaŭ



du markojn. La sinjoroj en bluj aŭ grizaj vestoj dormetas; inter cent viroj nur unu virino: matena trajno, manaĝera trajno. Dumtage la publiko estas pli miksitaj, la prezoj estas moderaj. La vojaĝo Kioto — Tokio kostas 8800 Yen (100 Yen = 1,09 DM) la vojaĝo Hakata — Tokio kostas 15 300 Yen.

En Nagoja. Homvicoj ĉe la sagoj, la vagono pleniĝas sen interpretado ĝis la lasta sidloko. Estas Hikari-trajno, ĝi ne haltos dum la venontaj du horoj ĝis Tokio. La H-trajnoj nur haltas en grandaj stacioj, malgrandajn priservas la K- (Kodama)-trajnoj, kiuj pro tio bezonas unu horon pli da tempo inter Kioto kaj Tokio.

Nekredebla por ni eŭropanoj estas la densega trajnsinsekvo. Ekzemple en la dumiliona urbo Nagoja kun tekstilaj, ceramikaj kaj pezaj industrioj, la ekvetura tabelo indikas por la direkto al Tokio; H 7.09; K 7.17; H 7.31; K 7.36; H 7.55; K 8.00; H 8.19; K 8.24 kaj tiel plu, same multajn trajnojn al Osaka, Okajama aŭ Hiroŝima. Tia frekvenco nur eblas sur tute memstara relvojo kia estas la Ŝinkanzen- aŭ Tokajdo-linio, kiel oni ankaŭ ĝin nomas. Tokajdo estis la iama vojo inter Tokio kaj la imperiestra urbo Kioto. La fervojo, kiu poste ĝin sekvis, estis etŝpura. Kun Ŝinkanzen la Japanaj Fervojoj — entrepreno kun 430 000 kunlaborantoj — transiris al la normala ŝpuro de 1435 mm. Sed sole tia klasika ŝpurrezuro memorigas pri Stephenson kaj la 19a jarcento. La kuraĝe projektita traco kun larĝradiusaj kurbiĝoj necesigis kelkcent da tuneloj kaj preskaŭ cent pontojn. Ĝi sekvas la idealan linion preskaŭ tute. La plej longa tunelo mezuras 18,7 km. Hermetika klimatizinstalaĵo certigas, ke la pasaĝeroj neniel sentas la aerprensantaĝojn en aŭ ekster tuneloj. Rapidecreduktoj pro konstrulaboroj ne okazas, nur dumnokte oni riparas, kiam trajnoj ne cirkulas. Trakesplortrajno dumtage ekzamenadas la relvojojn por ekkoni riparendajn mankojn. Cetere oni ne ŝparis ĉe la trakmaterialo, precipe ne en la sudo, sternante la relvojn sur betonon sen ŝtonbalasto. Tio kostis la duoblon, sed multege faciligas la trakprizorgadon.

Akurateco kaj rapideco — jen kio gravas sur Tokajdo-linio. Sajne preterflugas Japanio antaŭ la fenestroj, tiu industri-

plena pejzaĝo kun altaj kamenoj, elektraj trusfostegoj, kun senfinaj vicoj da dometoj, inter ili la zorge konservitaj verdejoj kaj arte aranĝitaj ĝardenoj, teo-plantejoj kaj subakvigitaj rizo-kampoj kun altkuraj blankaj gruoj, kvazaŭ ekzotika pentraĵo. Jen kaj jen troviĝas altaj ŝtalstangoj portantaj retotegmenton super terpeceto, kie la pasie golfludantaj japanoj reve forgesas sian tro popolplenan insularon.

En la memserva bufedvagono la vibranta montrilpinto de la rapidometro indikas 200 km/h. La kondukisto en la stirejo antaŭ la regadbutonoj, kiu same portas blankajn gantojn kiel ĉiuj konduktoroj, povas akceli sian motortrajnon ĝis 210 km/h. Malantaŭ la vitro de telefonĉelo en angulo de la „Quick-Pick“-vagono gravmiena viro telefonas kun la preter-rapidanta ekstera mondo: tutaŭtomata tele-elektado, bona interkomunikigo. En etaj kurtenfermitaj kupeoj kun spugulo kaj lavpelvo viroj sin razas. Sur la necesaj pordoj estas skribite „japanstila“ aŭ „ĝentlemana“: tio promesas eŭropecan sidinstalaĵon.

Sidlokrezervaro estas deviga en Ŝinkanzen-ekspresoj, tamen unu aŭ du vagonoj estas je dispono por tiaj pasaĝeroj, kiuj ne ĝustatempe sukcesis utiligi la elektronikan rezervadsistemon, aŭ kiuj maltrafis sian — ĉiam akuratan — eksprestrajnon kun la rezervita sidloko.

Laŭtparolila virinvoĉo avertas: „Se vi malkovras iun neidentigeblan objekton aŭ materialon bonvolu informi la konduktoron!“ Ĉiu trajno estas akompanata de du fervojaj policistoj, sekurecon oni tre alte taksas. La trajncirkulado estas komputere kontrolita, nenia menciinda akcidento ĝis nun okazis. Nur korvoj, kiuj estis konstruitaj siajn nestojn tro proksime apud kurento-konduktiloj, foje perturbis complete la trafikon.

Denove laŭtparolila voĉo: Oni pardonpetas, ke la trajno malfruiĝis je 3 minutoj. Post kvaron-horo oni estos en Tokio. Du horojn kaj 51 minutojn bezonas Hikari-ekspreso por la 513 km de Kioto al Tokio. 260 trajnoj trafikas ĉiutage sur la Tokajdo-linio, 130 en ĉiu direkto. Oni ekkomprenas la grandegan signifon de tiu transportsistemo por la ekonomia evoluo de la lando. Ĉio granddistance fora tute proksimiĝas al la metropolo per



tiuj „pafilaj-trajnoj“ kiel oni ofte nomas ilin. Fora provinco ne plu ekzistas.

„Tokio, Tokio“ anoncas la surkaja laŭtparolilo, plezure longigante la i-on. Centoj ŝoviĝas laŭ ŝtuparoj malsupren tra la ĝiĉethalo por viciĝi ĉe la taksio-haltejoj. Sur la kajo aperas la purigistinoj. Ili trairas la vagonojn, klapturnas la seĝapogilojn en la kontraŭan direkton kaj surmetas de kapalteco novajn blankajn tukojn sur la apogilojn. Post nur 15 minutoj la trajno estas purigita kaj ordigita por nova ekveturo.

La inaŭguro de la Ŝinkanzen-linio en 1964 estis historia evento por Japanio. Jam

en Majo 1976 la nombro de transportitaj pasaĝeroj atingis la unuan miliardon! Meznombro estas nun duona miliono ĉiutage. Japanoj amegas sian fervojon.

Planoj antaŭvidas la plilongigon de la reto al 7 000 km dum la venontaj jardekoj. Jam kelkajn jarojn oni laboradas en la centmetrojn submara tunelo inter la ĉefinsulo Honŝuo kaj la norda insulo Hokajdo, projekto unika tutmonde. Nur viroj rajtas labori en la subteraj fossejoj, ĉar la Dio de Montoj laŭ la Ŝintokredo estas insekse kaj tial ĵaluza kontraŭ ĉiu virino . . .

(laŭ „Schöne Welt“ 10/78 tradukis Gernot Ritterspach)

### En brazila parlamento

La 19an de Aprilo 1978 en la Federacia Parlamento deputito Marcelo Linhares faris paroladon okaze de la datreveno de la morto de D-ro Zamenhof. Emfazante la grandecon de la iniciatinto de Esperanto, la deputito skizis la historion de la lingvo kaj movado kaj atentigis, ke la ĉefurbo de Brazilo gastigos la 66an UEA-kongreson en 1981. Kvankam en la lando ne ekzistas oficiala parlamenta grupo de esperantistoj, inter la deputitoj troviĝas multaj apogantoj kaj eĉ pluraj parolantoj de la Internacia Lingvo.

### Esperanto en komerco

La Esperanto-grupon PTT en Genova/Italio vizitis industria reprezentanto, kiu petis informojn pri la Internacia Lingvo. Post la unua kontakto la reprezentanto de la firmao, aganta ĉefe en kampo de la „Instalistiko“, teknika kaj mekanika, sindeklarigis preta instrui Esperanton al siaj oficistoj por utiligi ĝin en la komercaj kaj industriaj rilatoj.  
El „Heroldo“ n-ro 10 (1634)/1978

### Esperanto-kursoj en Danlando

Pli ol 40 lernemuloj el 3 nacioj kolektiĝis en As Vig/Danlando de la 22a ĝis la 24a de Septembro por partopreni la semajnfinajn E-kursojn. Funkciis 5 diversgradaj laborgrupoj (inter ili infana grupo). La vesperoj estis dediĉitaj al amuzado kun popoldancoj. La kosto estis malaltaj, ĉar la partoprenintoj transprenis la necesajn praktikajn laborojn en la domo kaj la kuirejo.

Por interesuloj: la venontaj semajnfinaj E-kursoj okazos de la 18a ĝis la 22a de Majo kaj de la 21a ĝis la 23a de Septembro 1979. Adreso por informoj kaj aliĝoj: Lizzie Egholm, Vindingsvej 5, Stensballe, DK 8700 Horsens

Tiuj, kiuj serioze okupiĝas pri folkloraj kantoj skribu al Goar Engeländer, Thomasweg 3, D-4796 Salzkotten.

### Rückblick

1928 sendeten folgende deutsche Radio-Anstalten Esperanto-Kurse: Breslau, Danzig, Frankfurt/Main, Hamburg, Kassel, Köln, Königsberg, Langenberg (Rhld) und München.

In Schweden nahmen mehr als 4 000 Personen an den Kursen teil. In Madrid sprach Pfarrer Mariano Mojado ca. 350 mal im Radio in oder über Esperanto. Insgesamt 149 Radio-Anstalten in 33 Ländern

befachten sich zu dieser Zeit mit der Internationalen Sprache.

### IFEF-Abzeichen

zum Preis von 4,- DM können bestellt werden bei:  
BOS Bernhard, Bf Böhl-Iggelheim;  
Basa 953/852/70/55.

Redaktfino por n-ro 2/1979  
estas la 25. 3. 1979

## La fervoja trafiko inter Norvegujo kaj la FR Germanujo

En 1977 la ekonomia situacio en Norvegujo sekvis la ĝeneralan ekonomian stagnadon en la okcident-eŭropaj landoj, al kiuj Norvegujo vendas 80 % de siaj eksportaĵoj. Krom Svedujo kaj Britujo, la FR Germanujo estas la plej grava partnero. Pro tio ĉiu regreso en la koncernaj landoj havas sian konsekvencon ankaŭ por Norvegujo. Eĉ la produktado de oleo, kreskinta konsiderinde dum la lastaj jaroj, pligrandiĝis nur je 2 %. Pro la kreskantaj importoj la komerca bilanĉdeficito altiĝis je 32 %. Ĝojige malgranda estis la minimuma senlaboreco (0,6 % en Julio).

Por la trafiko inter Norvegujo kaj la FR Germanujo estas grava ankaŭ la longa distanco kaj la maro, kiu ĉiukaze devas esti trapasata survoje. Tiu geografia kaŭzo kontribuis al la ŝipa trafiko jam delonge la plej grandan parton de la internaciaj rilatoj. En la vara komerco kun la FR Respubliko la fervojo povos partopreni nur je 1,9 %, sed ankaŭ la transportoj per kamionoj estis relative

modestaj kompare kun la trafiko inter Danujo kaj Germanujo. El 700 000 tunoj da varoj la Germana Federacia Fervoj transportis 500 000 tunojn sur siaj linioj de respektive ĝis la germanaj havenoj. El la ceteraj 200 000 tunoj 45 % rilatis la rektan trafikon DB/NSB kaj 55 % la transiran trafikon de kaj al Norvegujo.

Per la norvega pasaĝertrafiko la DB enspezas jare po 3 milionoj da germanaj markoj. Tiu sumo estas malgranda kompare kun la enspezoj el aliaj landoj. Sed ankaŭ la pasaĝertrafiko fervoja staras en forta konkurenco kun aliaj trafikiloj, precipe kun aviadiloj, kiuj ofertas bonegajn kaj rapidajn servojn. Ekzistas ankaŭ bone frekventataj ŝiplinioj inter Norvegujo kaj Germanujo. La prospero en Norvegujo kaj Germanujo dum la lastaj du jardekoj kondukis al kreskanta trafiko. La fervojoj de ambaŭ landoj klopodas almenaŭ konservi la kvoton de la fervojo al la entuta trafika merkato. Tio estas malfacila sed ne malesperiga tasko.

W. B.

el: Norvega Esperantisto

## Ni legis por vi en Heroldo

### Praga 78

300 00 interesuloj vizitis la tutmondan filatelan ekspozicion. Inter alia ankaŭ nia kolego Mager/Frankfurt (M) montris fakajn kolektojn pri historio, pioniroj kaj atingoj de Esperanto.

### Freiburg/Breisgau

Ĉe la klubo de jugoslavaj gastlaboristoj funkcias Esperanto-sekcio.

### Io nova en Rumanio

Ekzistas ebleco oficiale studi la internacian lingvon en filologiaj fakultatoj. Jam 12 studentoj esploras esperantajn temojn kaj du doktoriĝaj tezoj koncernis Esperanton.

### Dulingva horaro

La fervoja horaro de la stacidomo Ŝibenik/Jugoslavio aperis grandformate krom en la kroata ankaŭ en la Internacia Lingvo.

### Esperantologio

„Einführung in die Esperantologie“ titoliĝas la verko de prof. P. Janton, tradukita el la franca lingvo de G. kaj M. Becker.

### Vitaminoj por la koro

„Bond zonder Naam“ estas tre populara help-organizaĵo en la flandria parto de Belgio. Unu el ĝiaj servoj nomiĝas „Vitaminen voor het hart“. Ĉiu kiu telefonas tien, ekaŭdas korvarmigan tekston en la nederlanda kaj ek de la 15a de Decembro 1978 ankaŭ en Esperanto. Turnante la numeron 0 31 / 35 12 67 oni aŭdas kuraĝigan tekston en la Internacia Lingvo kaj, aldone, novaĵojn pri gravaj Esperanto-okazintaĵoj. La servo funkcias tage kaj nokte, escepte inter la 18a kaj 20a horo. Ĉiun duan semajnon oni ŝanĝas la tekston.

En la Bleicher-Verlag, Postfach 70, 7016 Gerlingen, novaperis en dua prilaborita kaj plibonigita eldono Mein geliebtes Esperanto Mia amata Esperanto de Richard Schulz 220 paĝoj, kartonita, 14,80 gm kaj TRIXINI — der Magier mit dem Blauen Stein, 156 paĝoj, 24,— gm.



**Estraro kaj komisiitoj de la unuiĝo Germana Esperanta Fervojista Asocio  
en la Sociala Organizo de Germana Federacia Fervojoj  
Stato: Januaro 1979**

**Estraro**

**Prezidanto:** BAR a. D. Gießner,  
Bf 3420 Herzberg (Harz); Basa 949/887/144;  
poŝte: 0 55 21 / 45 86

**Vicprezidanto/Redaktoro:**

BAR Graß, BD 5000 Köln - F-Büro,  
F 12 - Basa 943/1641 privata adreso:  
Meteorstraße 13, 5650 Solingen 11  
**Sekretaro:** BAmtm Schrapp, SV Nord,  
- Gruppe BVA - 4400 Münster (Westf.);  
Basa 945/1771

**Apartaj komisiitoj**

**Administradoro de la BSW-financrimedo:**  
BHS-in a.D. Elfriede Kruse, Wiener Str. 121  
6000 Frankfurt/Main 70, telef. 06 11/65 73 65

**Arkivo:** BHS Barmaneter, Bf 8940 Memmingen;  
Basa 912/864/394

**Biblioteko kaj gazetkolektado:**

BAmtm Rösemann, BD 3000 Hannover,  
Bf 70, Basa 949/2378 aŭ 1350

**Bulteno-dissendo:** BOS Schindler,  
Bf 5830 Schwelm (Köln); Basa 943/828/126

**Fakterminaroj:** HLOkf Hartig, Bw 2800 Bremen  
Hbf; Basa 949/832/365

BAR Ritterspach, ZVL 6500 Main, AA 5005,  
Basa 954/5533

**Lingva ekzamenoj kaj instruado:**

BAR Lautenbach, Bf 6400 Fulda;  
Basa 957/822/122

**Kasisto:** BOS Bernhard, Bf 6703 Böhl-  
Iggelheim; Basa 953/852/70/55

**Verbado / Informado:** TBAR Brandenburg,  
Hbm 4400 Münster (Westf.); Basa 945/397

**Ekspozici-akipaĵo:** Grf Wentker aŭ (kaj)  
Grf Mertens, ambaŭ en Hochbaubahn-  
meisterei (Hbm) 4400 Münster/Vestfaliao;

Basa 945/1498. Eksped-adreso: Hbm  
Münster i. W., Lager Ga.

**Distriktaj komisiitoj**

**Essen:** TBOS Retzlaff, BD Essen,  
- T-Büro, Tb 47; - Basa 944/5719

**Frankfurt/Main:** BAmtm Kiefer, BSA 6000  
Frankfurt/Main, AA 341, Basa 955/5656

**Hamburg:** BAR i.R. Lepke, 2000 Hamburg 52,  
Tellkampfweg 6b. Deĵorajn postaĵojn al  
BSW Hamburg - SW 64 -;  
Basa 947/5755 (ĵaŭde)

**Hannover:** BBI Heimlich, Bm 3040 Soltau;  
Basa 949/816/127

**Karlsruhe:** BAR Hug, BD 7500 Karlsruhe  
- P-Büro Ps 26; Basa 953/5005

**Köln:** BAmtm Herlitze, BD 5000 Köln,  
Büro B (Ozl); Basa 943/473

**München:** Weidacher, Bf 8000 München-Ost;  
Betreuungsstelle, privata adreso: Schnee-  
finkenberg 11, 8000 München 82

**Nürnberg:** BHS Müller, Bahnpolizeiwoche  
Hof, Bp-Posten 8620 Lichtenfels; Basa 966/  
842/388

**Saarbrücken:** BHS Müller, Bm 6620 Völk-  
lingen; Basa 956/8113/134

**Stuttgart:** TBOAR Krüger; BD 7000 Stutt-  
gart, Bmkr. 3; Basa 952/5725

**Peto al la eksterlandaj geamikoj!**

Ĉi tie ni komunikas la aktualan adresaron  
de la GEFA-estraranoj kaj de la komisiitoj.  
Bonvolu korekti vian liston kaj eventuale  
ŝanĝi la preparitajn adresojn por garantii  
la akuratan akcepton. Se vi mem havas  
dezirojn rilate la akcepton de nia BULTENO,  
ni urĝe petas informi nian sekretaron.

**Esperantista kulturdomo Kastelo  
Grésillon, F-49150 Baugé, aranĝoj en 1979**

**printempo:** Renkonto de infanoj kaj  
praktika pedagogio ek de la 11a ĝis  
la 18a de Aprilo,

**somero:** Tritermaj prelegoj, diskutoj,  
praktiko kaj studo de la lingvo, teatra  
laboro kaj ekskursoj  
inter la 2a kaj 21a de Julio kaj kursoj  
- rektmetoda kurso por komencantoj,  
grupa praktikado, studado de la lingvo,  
manlaboroj kaj ekskursoj - inter la  
23a de Julio ĝis la 11a de Aŭgusto.  
Artlaboroj - fotarto, folkloraj dancoj,  
studado kaj praktiko de la lingvo kaj  
ekskursoj

inter la 13a de Aŭgusto ĝis la 1a de  
Septembro.

Sesioj de ekzamenoj estos organizitaj,  
kvankam la celo de la kursoj ne estas la  
preparado de tiuj ekzamenoj.

La aliĝintoj, kiuj ne deziras restadi dum  
tuta periodo devos tamen alveni iun  
lundon kaj foriri iun sabaton.

**Dana jarkongreso**

Okazos de la 27a ĝis 29a de Aprilo 1979  
en Psikologia instituto en Arhus. La  
prezidanto de la komitato estas:  
Ingvard Kensing, Assensgade 18,  
Dk-8000 Arhus C.